

Numero:222 .
Novembro 2010.

18-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Ĉu necesas lerni lingvojn?

La terglobo fariĝis tro malgranda. Dum kelkaj horoj aeroplano povas ĉirkaŭflugi ĝin. Nuntempe ne estas granda entrepreno vojaĝi al malproksimaj urboj. Homoj ekiras viziti diversajn landojn, kaj dum tio vole - nevole ili renkontiĝas kun fremdlingvanoj.

Dum tiaj vojaĝoj ofte okazas ridindaj situacioj, kiam la turisto volas komprenigi sin eksterlande kaj neniu komprenas la alian.



Kio estas la solvo?

Oni diras: la lingvolernado.

Sed kiom da lingvoj ekzistas sur la terglobo? Ne ekzistas homo, kiu estus kapabla ellerni tiom da lingvoj.

Kiun aŭ kiujn lingvojn oni lernu? Estas kiuj ĵuras la unusola helplingvo povas esti nur la angla, ĉar ĝi estas disvastiĝinta en la tuta mondo.


Ĉu tiel simpla estus la solvo? Ĉiu ellernu la anglan lingvon kaj je sorĉovorto malaperos la lingvaj miskomprenoj?

Tio estas bela sonĝo.

Fakte la angla lingvo estas uzata kaj parolata en multaj landoj.

Ĉu iu ekzamenis, en kiuj landoj ĝi estas oficiale parolata kaj uzata? Nun mi ne pensas pri Anglio aŭ ekzemple Usono ktp., kie la praloĝantaro memvole akceptis ĝin, aŭ antaŭe kolonistoj alvenis kaj perforte pelis la lokajn lingvojn kaj kulturojn.

Ankaŭ tio estas fakto. Pri ĝi ni ofte forgesiĝas. Ni pensas, ke en tiu fora lando aŭ tereno ekde la ekzisto de la mondo ĉiam oni parolis la anglan lingvon.



Sed eble el ni multaj ne scias, iam ankaŭ tiam ekzistis lokaj lingvoj per kiuj la praloĝantoj komunikis.

Alvenis konkerantoj kaj ili tuj komencis disvastigi sian lingvon, kulturon kaj religion.

Pasis jarcentoj kaj en tiuj landoj kripliĝis la lokaj lingvoj aŭ kunfandiĝis kun la angla kaj naskiĝis miksaĵolingvoj.

Ni esperu, ke en la sekvaj jarcentoj ne formortos ĉiu lingvo. Ankaŭ niaj pranepoj povos admiri la riĉecon de la lingvoj. Tial estas necesa, ke ni lernu kaj flegu naciajn lingvojn kaj ni komuniku eksterlande per Esperanto. Tio ĉi dependos nur de ni.



-Redaktanto-

Popolkanto elgermanigis Arthur DEGEN

Sopiris junreĝido
kaj bela reĝidin',
sopiris amkunvenon
-- la mar' malhelpis ĝin.

"Karulo, vi povas naĝi,
aĥ naĝu do al mi!
Kandelojn mi bruligos.
Allogu vin la tri!"

Malica monaĥino
maldormis pro envi';
la kandelojn ŝi estingis.
-- En ondoj dronis li.

Fiŝisto longe serĉis
-- lin trovis en la mar'.
Kun pala la virgolino
ploradis bord-florar'.

Ŝi prenis la karulon,
karese kisis lin. --- --
De alta roko saltis
en maron la reĝid'.

Sonoras de la turoj
-- vualas sin la sun',
ĉar ambaŭ gereĝidoj
en tombo dormas nun.



Publika letero por la malamikoj de Esperanto



Estimataj!

Kial Vi estas kontraŭ Esperanto? Ĉu tial ĉar ni geesperantistoj povas komuniki unu kun la alia? Kial Vi ne lernas tiun ĉi grandiozan lingvon?

Dum jardekoj Vi lernis diversajn mondlingvojn kaj krom kelkaj bagatelaj vortoj kaj esprimoj Vi scias preskaŭ nenion el la lernita lingvo.

Mi scias, ĉiu lingvo estas ellernebla. Oni nur devas voli kaj tiam ĝi sukcesas.

Mi konas homojn, kiuj diligente lernis iun mondlingvon kaj preskaŭ perfekte ili ellernis ĝin. Sed tiaj homoj estas malmultaj.

La lingvolernado estas malfacila laboro kaj nur kelkaj homoj estas kapablaj bone ellerni iun lingvon.

Kiujn lingvojn Vi parolas?

Mi estas scivola, ĉu vi efektive scias fremdan lingvon krom la gepatra aŭ Vi nur balbutadas, se Vi devas komuniki kun eksterlandano.

Esperanto estas ankaŭ por Vi. Per tiu ĉi lingvo Vi povas komprenigi Vin kun aliaj geesperantistoj kie ajn en la mondo.

Mi petas Vin, faru nenion kontraŭ la zamenhofa lingvo!

Neniu devigas Vin ellerni ĝin. Vi mem decidu, ĉu Esperanto interesas Vin aŭ Vi preteriras ĝin indiferece.

Mi tre esperas, alvenos tempo, kiam ankaŭ Vi ekvidos en ĝi la utilojn kaj la belecon de la lingvo. Ne estu kontraŭ Esperanto, sed provu akcepti ĝin.

Por multaj homoj tiu ĉi lingvo estas tre grava kaj jam ili ne povas ekzisti sen ĝi.

Kial Vi insultas iliajn sentojn?

Ĉu ne estas komuna celo, ke ni povu senfacile paroladi unu kun la alia? Ĉu ne estus bone vivi en tia mondo, kie malaperos la lingvaj bariloj? Kiel Vi opinias pri ĝi?

Mi atendas Vian sinceran respondon.

Ni ne estu malamikoj pro Esperanto. Provu akcepti nin geesperantistojn.

Se Vi fine decidis ellerni la zamenhofan lingvon, ni volonte helpas al Vi.

Amike Vin salutas:

Esperantisto

Kaposvár, la 17-an de novembro 2010.

Mia amiko rakontis



Kun mia amiko mi sidis sur la benko en la ĝardeno. La vetero estis agrabla. La suno brilis sed ni tre bonfartis sub la granda pomarbo. Ni babiladis.

Mia amiko antaŭ nelonge venis hejmen el Francio. Du semajnojn li pasigis en tiu ĉi admirinda lando.



Li vizitis ankaŭ la francan ĉefurbon, Parizon. Tie okazis al li la sekva aventuro.

Li ĝuste promenadis ĉe la fama turo Eiffel, kaj neatendite li rimarkis ĉarman junulinon. Li ankoraŭ neniam vidis tian belecon. Lia koro ekpulsis, kaj li decidis amindumi al ŝi.

En la mezlernejo li lernis kvar jarojn la francan lingvon, eĉ li faris abituriantan ekzamenon el ĝi. Laŭ lia instruistino mia amiko tute bone scias tiun ĉi mondlingvon. Do li kuraĝe alpaŝis la junulinon.

-Bonan tagon fraŭlino! – li salutis ŝin en franca lingvo.

La knabino unue surpriziĝis, sed fine ŝi rekonsciiĝis kaj gaje akceptis la saluton.

-Salut'! – ŝi pepetis – Kion vi deziras?

Ili ambaŭ parolis en la franca lingvo. La junulino uzis strangan akcenton kaj tial kelkfoje li malfacile komprenis ŝin.

Tamen ili tute bone komprenis unu la alian. Vespere jam kune sidis en animagorda restoracio kaj poste... Certe mi ne devas diri kio okazis?

Matene ili vekigis en modesta hotelĉambro. Li ankoraŭ volis dormeti. La junulino iris en la banĉambro, de kie li neatendite aŭdis konatan melodion en sia gepatra lingvo.

Mia amiko eksaltis kaj kuregis al la pordo de la banĉambro. Li mire demandis:

-Ĉu vi estas hungarino?

Tuj venis la respondo:

-Jes. Ĉu vi ne estas franco? Verdire vi parolis en stranga dialekto, sed mi pensis, ke vi ne estas parizano.

Ili laŭte ekridis kaj plu ili ne devis uzi la francan lingvon.

Hejmenveninte ili geedziĝis baldaŭ, kaj ili feliĉe vivas unu kun la alia. Ili komune instruas al sia fileto la francan lingvon.

-Ŝaŝa-

POEZIO

Julio Baghy
de Jiří KOŘÍNEK



Nenie fride oratoras
vortĵongla rimo por ostento
kaj de l' poet' inteligento
kun vero kaj senfals' laboras.


Se ie pli da sprit' parolas
kaj ie pli da arda sento,
el pura arto kaj talento
kaj homa koro ambaŭ bolas.

Pli ol la vortoj por omaĝo
al tiu rara homaran',
parolas al ni ĉiu paĝo,

kiun elektos nia man',
por nin flugigi el la kaĝo
al vasta belo-ocean'.



Lia patro estis drama aktoro kaj lia patrino estis teatra sufloro. Post liaj lernejoj studoj ankaŭ li fariĝis aktoro kaj reĝisoro de diversaj teatraĵoj. La milito rompis lian karieron kaj ses jarojn li devis pasigi for de sia patrujo en rusa militkaptiteco. Ankoraŭ dum lia junaĝo multaj liaj poemoj kaj noveloj hungarlingvaj aperis en hungaraj gazetoj. En 1911 li ekkonis Esperanton kaj ĝia "interna ideo" tuj forlogis lin. Lia ampleksa Esperanto-agado komenciĝis jam en la Siberia militkaptitejo, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacianoj. Alveninte al Hungarujo post la milito, li fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la Esperanto-movado: multaj diversgradaj kursoj, gvidado de E-Rondo Amika, aranĝo de literaturaj vesperoj, ktp.



Al poeto
de Jiří KOŘÍNEK



(Al sepdekjariĝo de Doktoro Kolomano Kalocsay)

El pasinteco diletanta
ankaŭ por vi, planlingvo nia,
venis la temp' de verko granda
kaj elmaturis vers' genia.

Pruvite estis, ke vi taŭgas
por altsvingiĝo plej pretenda,
ke via kanto elokventa
majeste sonas kaj ne raŭkas

pro anemio artomanka,
sed al popolo via danka
streĉita kord' arĝente sonis
kaj perspektivojn novajn donis

montrante kiel iri plue.
Ĝis en buked' por eterneco
lumonta torĉe kaj instrue
skulptiĝis belopec' al peco.

En via hor' amardolora,
vi, juna lingvo, naskis filon,
en lian manon metis liron,
ke monden sonu kanto glora.

Esprima riĉo kaj nuanco
de belĉasant' kun ora lanco
per lingvosento al ni vortis
kaj al vi, lingvo, freŝon portis.

Ni, kiuj al li venis lerni,
ekkonis, ke ĉi tiu grava
verk' majstra daŭros por eterni
kaj ĉiam pli sin montros prava.



Por infanoj



AVENTUROJ EN ESPERANTUJO

Dua ĉapitro

La larĝa avenuo kondukis al la urbodomo. Ambaŭflanke estis altaj arboj. Ili apenaŭ povis turni sian atenton al la multaj vidindaĵoj. Sur la stratoj homoj promenadis aŭ rapidis ien. Ĉiuj parolis Esperanton. En tiu ĉi urbo ne ekzistis lingvaj miskomprenoj.

La urbestro jam atendis ilin ĉe la pordego de la konstruaĵo.

-Mi ankoraŭ ne vidis tian belegan urbon – rimarkis Kristina.

Peĉjo konsentis, kaj li tre ĝojis, ke li ellernis Esperanton, tiun ĉi utilan kaj belsonan lingvon.

-Estu salutataj en la ĉefurbo de Esperantujo – salutis ilin la urbestro kaj li malfermis larĝe la pordegon antaŭ ili – Por mi estas granda ĝojo akcepti vin ĉi tie. Esperanto Movado bezonas la gejunulojn. Laŭdinde, ke vi lernis Esperanton. Baldaŭ vi renkontiĝos kun diverslingvaj geknaboj, sed mi garantias al vi, ke vi komprenos unu la alian. Vi ne bezonas interpretiston, se vi deziras komuniki kun ili.

Kristina kaj Peĉjo eniris la urbodomon. Ili estis gviditaj en grandan halon, kie jam estis multaj geknaboj. Ili sidis ĉirkaŭ longaj tabloj, kaj ili kolazionis. Ankaŭ la novalvenintaj geknaboj altabliĝis, kaj la urbestro prezentis ilin al la infano.

-Li estas Peĉjo el Hungario kaj ŝi estas Kristina el Pollando. Akceptu ilin bonkore kaj konatiĝu kun ili!

La infanoj amikeme akceptis ilin, kaj ili tuj komencis babiladi.

Ĉe la tablo sidis ĉina, rusa, franca kaj bengala infanoj. Ili estis simpatiaj. Precipe la franca knabino, kiu atakis ilin per multaj demandoj:

-Ĉu vi jam estis en Esperantujo? Pasintjare mi estis tie ĉi kun miaj gepatroj. Kie estas nun viaj gepatroj? Ĉu ili akompanis vin? Ĉu vi jam delonge konas unu la alian? Kiel vi korespondas? Ĉu interrete? Ankaŭ mi tre ŝatas babiladi rete kun miaj geamikoj.

Ili apenaŭ povis respondi al la franca knabino.

Post kelkaj minutoj al ili venis la infanoj de la aliaj tabloj. El ili blonda kanadanino Teresa proponis al Peĉjo kaj Kristina, ke ili iru al la ĝardeno de la urbodomo, kaj ili rigardu la tieajn belegajn rozojn. Onidire mem la urbestro zorgas ilin.

La ideo plaĉis al ĉiu, kaj lasante la kukojn kaj trinkaĵojn ili ĉiuj kuris al la ĝardeno.

La urbestro ridetante rigardis ilin kaj kiam ankaŭ la lasta infano forlasis la halon li diris:

-Ili estas la estonto de Esperanto.



La infanoj inundis la rozoĝardenon, kaj admiris la belegajn rozojn.

Kiam ili rigardis ĉiom rozojn, kiuj pompis en la ĝardeno alvenis virino kaj prezentiĝis:

-Bonan tagon, karaj etaj gastoj niaj! Mi estas Maria Karulino, la instruistino de la proksima bazlernejo Verda Stelo.

Peĉjo ektimis.

-Ĉu nun ni devos lerni? – li flustris al Kristina.

La knabino ne sciis la respondon. Ŝajnis, ke ankaŭ ŝin ne tro ĝojigis la alveno de la instruistino.

-Mi ne scias – ŝi diris.

-Kristinjo – tiris Peĉjo flanken la knabinon – ni rifuĝu de tiu ĉi loko. Al mi ne plaĉas, ke ni devos lerni. Mi ne volas lerni en tia belega, sunriĉa vetero. Mi proponas, ni ne iru kun ili. Laŭ mi malkovri la ĉefurbon estos pli interesa, ol sidaĉi en lernoĉambro. Ĉu ne?

Kristina ne kontraŭis Peĉjon.

Kiam la instruistino kaj la infanoj ne rimarkis, ili malaperis el la rozoĝardeno. La du geknaboj ekiris malkovri la ĉefurbon.



Ili povis forlasi la ĝardenon tute facile. Baldaŭ ili trovis sin sur la strato. Unue ili ne sciis kien iri. La urbo estis granda kaj nekonata.

-Kien ni iros nun? – demandis Kristina – Post kelkaj horoj vesperiĝos.

-Ne ĉagrenu! Ni iru al tiu giganta konstruaĵo! Rigardu, ĝi estas grandmagazeno! Tie certe estas multaj vidindaĵoj kaj amuzejoj.

La knabino sekvis Peĉjon. Estis bone, ĉar sur la strato ili komprenis ĉion helpe de Esperanto. Ankaŭ la homoj parolis en tiu ĉi lingvo.


-Bone, ke mi ellernis Esperanton. En tiu ĉi lando ni ne havos lingvan malfacilaĵon – diris Peĉjo, kiam ili atingis la grandmagazonon.

Ĉe la enirejo ili trovis hundeton, kiu tuj ekplaĉis al la du geknaboj.

-Rigardu, kiel ĉarma hundeto! – ĝojegis Kristina kaj demandis de la besto – Ĉu vi deziras veni kun ni?

(daŭrigota)

Gajaj bildoj



Ekde hodiaŭ vi parolos nur la komputilolingvon.




Fileto mia, kiam mi povos babiladi per ĝi kun mia brazila esperantista amikino?



Antaŭ jaroj mi estis instruisto de la angla lingvo, sed ekde tio, ke Esperanto fariĝis la unusola mondlingvo mi ne havas laboron.



Sinjoro generalo, mi anoncas, je via ordono mi ellernis Esperanton.



Anstataŭ tio mi lernas Esperanton



Kara najbarino, ĉu vi venos hodiaŭ al la loka Esperanto klubo?